

### Veranstaltungshinweise

Unsere **Esperantokurse** für: a) Anfänger mit Vorkenntnissen: Do. 19:30-21:00 Uhr, Gaststätte *Friesenheim*, Friesenstr. 15, 26935 Rodenkirchen; b) Fortgeschrittene: Do. 19:45-21:15 Uhr, Evangelisch-lutherische Kirchengemeinde Brake, Kirchenstr. 24, 26919 Brake. – Nächste **Vereinstreffen**: am **14.07.2007** um 17:00 Uhr (**Sommerfest mit Möglichkeit zum Flug mit Motorsegler ab 14:00 Uhr**, Grillplatz am Flugplatz Blexen, Am Rhynschloot, 26954 Nordenham) und am **15.08.2007** um 19:30 Uhr (*Panorama*, Elsfleth). Wir präsentieren unseren Verein auch beim diesjährigen Festumzug des **Rodenkircher Marktes** am **22.09.2007**. Aktuelles und Einzelheiten können unserer Netzseite <http://www.esperanto.de/unterweser/aranghoj.htm> entnommen oder bei Anne Höpken, Tel.: 04731-4837, erfragt werden. Gäste sind willkommen. Außerdem:

16.06.2007 Jubiläumsfeier v. Esperanto-Noord Nederland, Terhorne, NL  
 28.07.-04.08.2007 7. Kongress d. Europ. Esperanto-Union, Maribor, Slowenien  
 04.-11.08.2007 92. Esperanto-Weltkongress, Yokohama, Japan  
 23.09.2007 *4-a Rata Rendevuo*, Hessisch Oldendorf  
 05.-07.10.2007 Esperanto-Sprachkurse (drei Niveaus), ICH<sup>1)</sup>  
 08.-12.10.2007 Esperanto-Sprachkurse (drei Niveaus; m. Ausflügen), ICH<sup>1)</sup>  
 13.10.2007 EMAS<sup>2)</sup>-Kulturtag, Oldenburg  
 19.-21.10.2007 100-jähriges Jubiläum der Esperanto-Vereinigung  
 Münster, Nordwalde (int. Wochenende mit Esperanto Nederland)  
 02.-04.11.2007 Sitzung d. Rates d. Esperanto-Landesverbände, Ort: N. N.  
 30.11.-02.12.2007 Esperanto-Sprachkurse (drei Niveaus), ICH<sup>1)</sup>  
 03.-07.12.2007 Esperanto-Sprachkurse (drei Niveaus; m. Ausflügen), ICH<sup>1)</sup>

<sup>1)</sup>ICH: Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, 37412 Herzberg, Tel.: 05521-5983

<sup>2)</sup>EMAS: Esperanto-Ligo de Malsupra Saksio (Landesverb. Niedersachsen im Dt. Esp.-Bund e. V.)

### Impressum:

*Zeitschrift:*

*Erscheinungsweise:*

*Herausgeber:*

*Information und Redaktion:*

*Bankverbindung*

*(für Beiträge und Spenden):*

Esperanto Gazeto (ISSN 1861-3330)  
 dreimal jährlich als Druckausgabe und  
 elektronische Ausgabe, Netzseite:  
<http://www.esperanto.de/unterweser/gazeto.htm>  
 Esperanto-Gruppe Unterweser e. V.  
 (<http://www.esperanto.de/unterweser>)  
 Anne Höpken, Magdalenenstr. 27,  
 26954 Nordenham, Tel.: 04731-4837  
 Dörte Bierkämper, Tel.: 04404-3368  
 Andreas Kück, Tel.: 04702-5044  
 Mario Müller, Tel.: 04732-1373

Raiffeisenbank Oldenburg eG  
 BLZ 28060228  
 Kontonummer 1200160000  
 (Kassenwartin: Dörte Bierkämper)

**EGU - Esperanto - Gruppe Unterweser e. V.**

# Esperanto Gazeto

N-ro 19

ISSN 1861-3330

Jun. – Sep. 2007

EGU-Info: <http://www.esperanto.de/unterweser>



84. Deutscher Esperanto-Kongress in Hamburg mit Kongressteilnehmern aus unserem Verein (von links nach rechts):

84-a Germana Esperanto-Kongreso en Hamburgo kun kongresanoj el nia klubo (de maldekstre al dekstre):

Marcel, Jessica, Mario, Kerstin, Hermann, Anke, Andreas, Renate, Günther, Waltraud, Alke, Anne, Udo-Eugen

### Ludvespero de la Esperanto-Grupo de Bremeno (Bremeno, 11-a de Aprilo 2007)

Ĉu vi bone konas Bremenon? Kaj ĉu vi certe posedas la Esperanto-numeralojn? Se tiurilate vi dubas pri viaj kapabloj, jen konsileto: Partoprenu en ludvespero de la Bremenaj esperantistoj. Tion ĉi faris ni (Alke, Anne kaj Andreas). Kaj ni estis rekompencitaj per distra vespero: Ruth okazigis divenludon pri Bremeno kun demandoj kiel ekzemple: En kiu monato okazas la tradicia "Schaffermahlzeit"? Ĉu la plej suda marhaveno de Germanujo vere estas en Bremeno? Poste ni ekzercis la Esperanto-numeralojn per bingo kaj pliajn Esperanto-vortojn per skrablo, ludoj, kiujn Elisabeth gvidis. Intertempe ni plifortigis niajn grizajn ĉelojn per bongusta bakaĵo. Ni dankas Ruth kaj Elisabeth por la instruplena ludvespero. – Andreas

### Spielerabend der Esperanto-Gruppe Bremen (Bremen, 11.04.2007)

Kennen Sie Bremen gut? Und beherrschen Sie sicher die Esperanto-Zahlwörter? Wenn Sie diesbezüglich Zweifel haben, hier ein Tipp: Nehmen Sie an einem Spielerabend der Bremer Esperantisten teil. Das taten wir (Alke, Anne und Andreas) und wurden mit einem unterhaltsamen Abend belohnt: Ruth veranstaltete ein Bremen-Quiz mit Fragen wie z. B.: In welchem Monat findet die traditionelle Schaffermahlzeit statt? Ist der südlichste Seehafen Deutschlands wirklich in Bremen? Danach übten wir Esperanto-Zahlwörter mit Bingo und weitere Esperanto-Wörter mit Scrabble, Spiele, die Elisabeth leitete. Zwischendurch stärkten wir unsere grauen Zellen mit leckerem Gebäck. Wir danken Ruth und Elisabeth für den lehrreichen Spielerabend. – Andreas

### Ekskurseto al Lemwerder (Lemwerder, 9-a de Majo 2007)

Okaze de sia naskiĝtago Elisabeth invitis esperantistojn de la kluboj de Bremeno kaj Unterweser al Lemwerder. Post la gratuloj kaj transdono de la donacoj Elisabeth regalis siajn gastojn per tre bongusta rabarbo-sufleo kun glaciaĵo. Krome ni aŭskultis la sonregistraĵon de interesa intervjuo pri Esperanto: Moderato de Radio Bremen 4 estis parolinta kun ŝia filino Anja kelkajn monatojn antaŭe okaze de la centjariĝo de la Bremena grupo. Ni estas ĝojigitaj de ŝia bonega prezento de Esperanto en la publiko. – Andreas

### Kurzausflug nach Lemwerder (Lemwerder, 09.05.2007)

Anlässlich ihres Geburtstags lud Elisabeth Esperantisten der Vereine Bremen und Unterweser nach Lemwerder ein. Nach den Gratulationen und der Überreichung der Geschenke bewirtete Elisabeth ihre Gäste mit leckerem Rhabarberauflauf mit Eis. Außerdem hörten wir die Aufzeichnung eines interessanten Interviews über Esperanto: Ein Moderator von Radio Bremen 4 hatte ein paar Monate zuvor mit ihrer Tochter Anja anlässlich des hundertjährigen Bestehens der Bremer Gruppe gesprochen. Wir sind erfreut von ihrer hervorragenden Darstellung von Esperanto in der Öffentlichkeit. – Andreas

## Enigma

	1	2	3	4	5	6
1						
2						7
3				8		
4		9				
5				10		

Ĝuste ordigite, la literoj en la grizaj ĉeloj rezultigas la nomon de loĝanto de Eŭropa lando.



Hermann Allmers en 1856; lin desegnigis Hermann Brücke

## Horizontale

1: parte simila [sen finaĵo]; 2: belarto pri aranĝo de sonoj; 3: organika kombinaĵo, anestezilo [sen finaĵo]; 4: germane: numero (mallongigo); 5: laŭ la kristanismo kreinto de la ĉielo kaj la tero; 8: prepozicio por montri kvanton; 9: france: kristnasko; 10: sondisko kun ciferecaj datumoj (per lasero skanata) (mallongigo)

## Vertikale

1: formale ŝanĝi leĝparton [sen finaĵo]; 2: doni manĝaĵon; 3: besto simila al ĉevalo; 4: antaŭa itala monunuo; 5: numeralo; 6: japana tabulludo [sen finaĵo]; 7: (muzika) voĉnivelo [sen finaĵo]

## Feldeinsamkeit

Ich ruhe still im hohen grünen Gras  
Und sende lange meinen Blick nach oben,  
Von Grillen rings umschwirrt ohn Unterlaß,  
Von Himmelsbläue wundersam umwoben.

Und schöne weiße Wolken ziehn dahin  
Durchs tiefe Blau, wie schöne, stille Träume; –  
Mir ist, als ob ich längst gestorben bin  
Und ziehe selig mit durch ewge Räume.

Hermann Allmers

## Kampo-soleco

Ripozas mi nun trankvile en herbo verda kaj alta  
Kaj la rigardon mi sendas malsuben dum longa temp' plu,  
De la grilar' chirkauate en ia proces' senhalta,  
Mi envolvitas mirakle de tiu forta chielblu'.

Kaj nuboj belaj kaj blankaj movadas sin tra tiu ĉi,  
Tra l' forta blu', kiel songhoj, kiuj belas kaj kvietas; –  
Chi nun al mi estas, kvazau antau de longe mortis mi  
Kaj kunmovighas felice tra spacoj, kiuj eternas.

Andreas tradukis tiun ĉi poemon de Hermann Allmers tiamaniere, ke ĝi estas kantebla laŭ la melodio de "Guantanamo": Tiucele ripetu po la unua kaj tria versoj de la unuopaj strofoj (kun mallonga paŭzo post la oka silabo). Kaj kiel refranon kantu dufoje: "Kampo-soleco, mirakla kampo-soleco!" Provu.

### Balail-ĵetado en primtempca vetero (Rodenkirchen, 17-a de Marto 2007)

Gastoj el la Esperanto-grupoj de Bremeno, Hamburgo kaj Hameln partoprenis en nia tradicia balail-ĵetado. En suna vetero ni migris laŭlonge de la vojo apud la digo. La teamoj ne nur ĵetadis la balailojn, sed interlude ankaŭ rulis lignodiskojn kaj – eble kiel postefikon de la lastjara Universala Kongreso en Italujo – boĉioglobojn. Post trihora migrado la deknaŭkapa grupo atingis la restoracion Friesenheim. Tie jam atendis vaporantaj pladoj kun bongusta krispbrasiko. Por la elekto de la brasik-gereĝoj la ĉeestantoj ekhavis la taskon desegni krispbrasikon per antaŭe disdonitaj diverskoloraj skribiloj.



*Flugis ne nur balailoj ... / Es flogen nicht nur Besen ...*

Tial ĉiuj tuj klopodis kiel eble plej trafe desegni krispbrasikon. Surprize po verda skribilo havis nur du el la artistoj: Mario kaj Anke, la novaj brasik-gereĝaj moŝtoj! Ni dankas la festkomitatanojn por la amuza tago. – Dörte, Hans Gerd

### Besenwerfen bei frühlingshaftem Wetter (Rodenkirchen, 17.03. 2007)

Gäste aus den Esperanto-Gruppen Bremen, Hamburg und Hameln nahmen an unserem traditionellen Besenwerfen teil. Bei sonnigem Wetter wanderten wir den Weg am Deich entlang. Die Mannschaften warfen nicht nur die Besen, sondern rollten beim Zwischenspiel auch Holzscheiben und – vielleicht als



*Schmeckt's? / Ĉu bongustas?*

Nachwirkung vom letztjährigen Weltkongress in Italien – Boccia-Kugeln. Nach einer dreistündigen Wanderung erreichte die neunzehnköpfige Gruppe das Restaurant Friesenheim. Dort warteten schon dampfende Schüsseln mit leckerem Grünkohl. Für die Kür des Kohlkönigpaars bekamen die Anwesenden die Aufgabe, Grünkohl mit zuvor ausgeteilten verschiedenfarbigen Stiften zu zeichnen. Sogleich bemühten sich daher alle, so treffend wie möglich Grünkohl zu zeichnen.

Überraschenderweise hatten je einen grünen Stift nur zwei der Künstler: Mario und Anke, die neuen kohlköniglichen Majestäten! Wir danken den Festausschussmitgliedern für den unterhaltsamen Tag. – Dörte, Hans Gerd

### Vizito de la ĝenerala sekretario de Nepala Esperanto-Asocio, Bharat Kumar Ghimire (Oldenburg, 18-a de Aprilo 2007)

Kadre de sia rondvojaĝo tra Germanujo, Bharat Kumar Ghimire, ĝenerala sekretario de Nepala Esperanto-Asocio, donis ankaŭ al nia klubo la honoron de sia vizito. Post la akcepto en la Oldenburga stacidomo fare de Alke kaj Brigitte, urborondiro, vizito de la universitata biblioteko kaj vespermanĝo, nia gasto en la hotelo StadtHotel prelegis pri sia lando kaj la tiea Esperanto-movado. Kvankam antaŭe en loka gazeto estis aperinta anonco pri la aranĝo, ĉeestis "nur" esperantistoj: ok el nia klubo; tri el la Esperanto-Grupo de Bremeno kaj kvar, kiuj ne estas membroj de loka Esperanto-klubo. Per fascinaj bildoj, el kiuj la plej multaj estis faritaj dum montara migrado en la regiono ĉirkaŭ la monto Annapurna, li peris informojn kaj impresojn pri Nepalo. Tiu ĉi hinduisma reĝlando situas inter Hindujo kaj Ĉinujo kaj estas preskaŭ duone tiel granda kiel Germanujo. Kompare kun tiu ĉi, multo estas malsama en Nepalo: sociaj kastsistemoj, 70 lingvoj kaj pejzaĝo, kiu laŭ altonivelo varias inter tropikvarmega ĝangalo kaj plej alta de l' mondo (Mount Everest, 8848 m). Post la prelego restis iom da tempo por demandoj, interalie pri la aktuala politika disvolviĝo, emancipado kaj edukado en Nepalo. Poste li devis adiaŭi nin, ĉar ankoraŭ la saman vesperon li pluvojaĝis al Munkeno. La vizito de Bharat okazis en amikeca etoso kaj denove montris la funkcion de Esperanto kiel taŭga neŭtrala kaj internacia lingvo. Ni dankas Bharat kaj ĉiujn aliajn, kiuj per tiu ĉi aranĝo igis nin travivi interesan kaj amuzan vesperon. – Andreas



*Bharat Kumar Ghimire*

### Besuch des Generalsekretärs des Nepalesischen Esperanto-Bundes, Bharat Kumar Ghimire (Oldenburg, 18.04.2007)

Im Rahmen seiner Rundreise durch Deutschland erwies Bharat Kumar Ghimire, Generalsekretär des Nepalesischen Esperanto-Bundes, auch unserem Verein die Ehre seines Besuches. Nach dem Empfang auf dem Oldenburger Bahnhof durch Alke und Brigitte, Stadtrundgang, Besuch der Universitätsbibliothek und Abendessen hielt unser Gast im StadtHotel einen Vortrag über sein Land und die dortige Esperanto-Bewegung. Obwohl zuvor eine Anzeige über die Veranstaltung in einer lokalen Zeitung erschienen war, waren „nur“ Esperantisten zugegen: acht aus unserem Verein, drei aus der Esperanto-Gruppe Bremen und vier, die nicht Mitglied eines örtlichen Esperanto-Vereins sind. Mit faszinierenden Bildern, von denen die meisten während einer Gebirgswanderung in der Gegend um den Berg Annapurna gemacht wurden, vermittelte Bharat Informationen und Eindrücke über Nepal. Dieses hinduistische Königreich liegt zwischen China und



Indien und ist fast halb so groß wie Deutschland. Im Vergleich dazu ist in Nepal vieles anders: gesellschaftliche Kastensysteme, 70 Sprachen und eine Landschaft, die je nach Höhenlage zwischen tropisch-heißem Dschungel und karger Schneewüste variiert mit Bergen, unter denen sich der höchste der Welt befindet (Mount Everest, 8848 m). Nach dem Vortrag blieb noch etwas Zeit für Fragen, u. a. zur aktuellen politischen Entwicklung, Gleichberechtigung und Bildung in Nepal. Dann musste Bharat sich von uns verabschieden, denn noch am selben Abend reiste er weiter nach München. Sein Besuch fand in einer freundschaftlichen Atmosphäre statt und zeigte aufs Neue die Funktion von Esperanto als geeignete neutrale und internationale Sprache. Wir danken Bharat und allen anderen, die uns mit dieser Veranstaltung einen interessanten und unterhaltsamen Abend erleben ließen. – Andreas

#### 84-a Germana Esperanto-Kongreso (Hamburgo, 25-a ĝis 28-a de Majo 2007)

Per 13 el la preskaŭ 200 partoprenantoj el 13 landoj ĉeestis nia klubo tiun ĉi kongreson, kies temo estis "Hamburgo – la kreskanta urbo". La kongresejo estis "Hotel Panorama" en la kvartalo Billstedt. Promeno montris la diversajn karakterizaĵojn de tiu ĉi kvartalo: Ĝi estas preskaŭ vilaĝa laŭlonge de la rivero Bille,



Finkenwerder

grandurba apud la larĝaj, multtrafikaj stratoj kaj malgrandurba apud la mallarĝaj, malmulttrafikaj stratoj. Interesaj prelegoj informis interalie pri: Esperantujo; la kreskanta urbo Hamburgo; ŝrumpantaj urboj sekve de manko de laborpostenoj; Esperanto kaj Eŭropa Unio; "Biero kaj Hamburgo". Vespere la grupo Kajto, la maristkanthoro "Henneberg Bühne Poppenbüttel", Ralph Glomp, Wolfgang Reisberg kaj Leo Sakaguchi prezentis folkloran, maristan, ŝlagran, pop- kaj dancmuzikojn. Aldone al la nokta ekskurso al Reeperbahn la kongresanoj povis elekti unu el tri ekskursoj:

Havena Urbo (nova ekonomie kaj kulture karakterizita kvartalo, kiu estas disvolviĝinta sur tereno ne plu bezonata kiel haveno); Finkenwerder (antaŭa fiŝkaptista vilaĝo kun belaj, malnovaj domoj); urbocentro (kun enrigardo en la vivmedion de senhejmuloj). Krome okazis la jarĉefkunveno de Germana Esperanto-Asocio kaj kunsidoj de fakaj kaj landaj asocioj. En la partoprenkotizo de tiu ĉi kongreso estis inkluzivita la prezo de la tagmanĝo (en la kongres-hotelo). Tio ĉi kuntenis la kongresanojn ankaŭ dum la tagmezpaŭzoj kaj ebligis viglajn konversaciojn. Tamen, oni trovas en Billstedt ankaŭ diversnaciajn restoraciojn. Tial kelkaj el nia grupo vespermanĝis foje en turka, foje en ĉina restoracioj kaj foje en restoracio de bona, tradicia germana kuirarto. Al nia klubano Marcel, kiu spertis sian naskiĝtagrevenon dum la kongreso, la Hamburgaj esperantistoj prezentis serenadon. La kongreso estis interesa, kaj ni denove havis multan plezuron kaj antaŭĝojas pri pli da aranĝoj en Esperanto-lando. – Anne, Andreas

#### 84. Deutscher Esperanto-Kongress (Hamburg, 25.-28.05.2007)

Mit 13 der fast 200 Teilnehmer aus 13 Ländern war unser Verein bei diesem Kongress vertreten, dessen Thema „Hamburg – die wachsende Stadt“ war. Kongressort war das „Hotel Panorama“ im Stadtteil Billstedt. Ein Spaziergang zeigte die verschiedenen Merkmale dieses Stadt-



An der Elbe / Ĉe Elbo

teils: Er ist nahezu dörflich entlang dem Fluss Bille, großstädtisch an den breiten, verkehrsreichen Straßen und kleinstädtisch an den schmalen, verkehrsarmen Straßen. Interessante Vorträge informierten u. a. über: Esperanto-Land; die wachsende Stadt Hamburg; schrumpfende Städte infolge Arbeitsplatzmangel; Esperanto und die Europäische Union; „Bier und Hamburg“. Abends präsentierten die Gruppe Kajto, der Seemannslieder-Chor „Henneberg Bühne Poppenbüttel“, Ralph Glomp, Wolfgang Reisberg und Leo Sakaguchi Folklore-, Seemanns-, Schlager-, Pop- und Tanzmusik. Zusätzlich zu dem nächtlichen Ausflug zur Reeperbahn konnten die Kongressteilnehmer einen von drei Ausflügen wählen: Hafenstadt (ein neuer wirtschaftlich und kulturell geprägter Stadtteil, der sich auf einem nicht mehr als Hafen



Geburtstagsständchen / Naskiĝtag-serenado

gebrauchten Gelände herausgebildet hat); Finkenwerder (ein früheres Fischerdorf mit schönen, alten Häusern); Stadtzentrum (mit einem Einblick in das Lebensmilieu Obdachloser). Außerdem fanden die Jahreshauptversammlung des Deutschen Esperanto-Bundes sowie Sitzungen von Fach- und Landesverbänden statt. Im Teilnahmebeitrag dieses Kongresses enthalten war der Preis des Mittagessens (im Kongresshotel). Das hielt die Kongressteilnehmer auch in den Mittagspausen zusammen und ermöglichte angeregte Unterhaltungen. Allerdings findet man in Billstedt auch verschiedene Restaurants unterschiedlicher Nationalitäten. Daher aßen einige aus unserer Gruppe mal in einem türkischen, mal in einem chinesischen und mal in einem Restaurant mit guter, traditioneller deutscher Küche zu Abend. Unserem Vereinsmitglied Marcel, der während des Kongresses Geburtstag hatte, boten die Hamburger Esperantisten ein Ständchen dar. Der Kongress war interessant, und wir hatten wieder viel Spaß und freuen uns auf weitere Veranstaltungen im Esperanto-Land. – Anne, Andreas